

Saluton !

He aquí un nuevo número del **Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto**.



Jen nova numero de la Bitbulteno de **Hispana Esperanto-Federacio**.

### ESPERANTO Y UNIVERSIDAD EN JEREZ DE LA FRONTERA

Dentro de apenas una semana, entre el 30 de octubre y el 1 de noviembre, tendrá lugar en Jerez de la Frontera el **19 Congreso Andaluz de Esperanto**. Los participantes podrán disfrutar de un intenso programa cultural y turístico, que puede consultarse en <https://andaluziaesperanto.wordpress.com/>.

El tema básico del programa cultural será "La universidad y el esperanto", dirigido no sólo a profesores y estudiantes universitarios, sino a todo el público en general. Tendremos charlas de diversos profesores de universidades españolas, y como huésped especial, contaremos con la presencia del prof. Duncan Charters, de la Sección de Lenguas y Culturas de la universidad Principia College, en Elmhurst, Illinois, en Estados Unidos.

Como prólogo, el jueves 29 de octubre a las 10:30h, en la Sala de Grados B del edificio de Informática y Telecomunicaciones de la Universidad de Málaga, el profesor Charters dará una conferencia con el tema "El esperanto en la universidad: experiencias, logros y perspectivas".

La actividad en medios universitarios ha sido descuidada en los últimos tiempos en el movimiento esperantista español, pero últimamente se han abierto numerosas oportunidades de informar sobre nuestra lengua, y además se ha notado un claro incremento en el interés de los investigadores en relación con el esperanto y su cultura. Tendremos, pues, la oportunidad de debatir sobre esta importante e interesante relación.

No faltarán además conferencias, juegos, momentos de socialización, sobre los que es posible informarse en [la web de la Unión Andaluza de Esperanto](#).

### ESPERANTO KAJ UNIVERSITATO EN LA PATRUJO DE ĜEREZO

Post apenaŭ unu semajno, inter la 30a de oktobro kaj la 1a de novembro okazos en Jerez de la Frontera (Ĝerezo, la patrujo de la fama vino, inter Sevilo kaj Kadizo) la **19a Andaluza Kongreso de Esperanto**. Partoprenantoj povos ĝui tre intensan kulturen kaj turisman programon, pri kiu eblas informiĝi en <https://andaluziaesperanto.wordpress.com/>.

La baza kultura temo de la kongreso estas "Universitato kaj Esperanto", do ĝi interesas al ĉiuj universitataj studentoj kaj profesoroj, tamen la eniro estas malfermita al ĉiuj geesperantistoj, ne gravas aĝo nek kulturo, ĉar la evento estas pripensita por ĉiuj. Prelegos diversaj esperantistaj universitataj profesoroj el Hispanio, kaj kiel speciala gasto ni kalkulas je la ĉeesto de Prof. Duncan Charters, el la Sekcio of Lingvoj kaj Kulturoj, Principia College Universitato, Elmhurst, Ilinojso, Usono. Profesoro Charters prelegos jam antaŭe, la 29-an de oktobro, en la Universitato de Malago, pri la temo "Esperanto en la universitato: spertoj, atingoj kaj perspektivoj".

Agado en universitata medio estis dum iom da tempo relative neglektata en la esperantista movado en Hispanio, sed en la lastaj tempoj malfermiĝis ŝancoj por informi pri nia lingvo tie, kaj krome videble kreskis la intereso de la esploristoj pri nia lingvo kaj komunumo. Do, oni studos kaj debatos pri tiu ege grava kaj interesa rilato.

Ne mankos aliaj prelegoj, ludoj, interkonaj momentoj, pri kiu eblas legi [en la retejo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo](#).

Tre grava estos ankaŭ la turisma programo. Ĝerezo, krom patrujo de la fama vino, estas lulilo de flamenka kanto kaj ĝi

También es muy destacable el programa cultural. Jerez es arte y es cultura, y en esa bella ciudad podrá disfrutarse del vino, del flamenco y de las bellezas arquitectónicas. Precisamente en uno de los salones del Alcázar se desarrollará nuestro evento. También se podrá visitar Cádiz, San Fernando y, al finalizar el congreso, el Parque Natural de Doñana. Habrá visita a una "yeguada" y se podrá disfrutar de un vino "Esperanto".



Para todos los detalles sobre inscripción, viajes y alojamiento, se puede visitar la página web: <https://andaluziaesperanto.wordpress.com/>. Ven a disfrutar de una oportunidad excepcional.

havas flughavenon, katedralon, universitaton, alkazonon, sennombrajn palacojn, monumentojn, ktp. En salono de la dekseca jarcento, ene de la Alkazaro, oni okazigos nian eventon. Temas pri malgranda salono de la palaco de Villaviciencio, ĉirkaŭata de ĝardenoj kaj historiaj artaĵoj, kiujn ni ĝuos dum tri neforgeseblaj tagoj.

Unu el la plej gravaj [ekskursoj](#) estas la vizito al la urbo Kadizo, tre proksima kaj kun grava historio kaj ni ankaŭ vizitos la faman Reĝan Instituton de la Mar-armea Observatorio. Postkongresa ekskurso estas planata al Sanlúcar per barko, kiu transiros la riveron Gvadalkiviro kun vizito al Natura Parko Doñana.

Komprenoble ne mankos ekskurso tra la urbo piede kaj buse, ĉar la urbodomo invitas al ĉiuj la ĉeestantoj vojaĝi senpage en la turisma buso. Oni ĝuos viziton al fama vin-kelo "Real Tesoro Valdespino", kiu estas belega palaco kun grandaj salonoj, muzeo kun originalaj gravuraĵoj kaj de Pablo Picasso kaj de Miró, krom la vastaj keloj plenaj je bareloj de bongustaj vinoj kaj likvoroj. Tie oni ankaŭ ĝuos spektaklon kun ĉevaloj. Ĉio kontraŭ malalta prezo kun gustumado kaj botelo da bongusta vino kun etiketo kiu rilatas al Esperanto kaj al nia 19-a andaluza kongreso.

Por ĉiuj ceteraj detaloj pri aliĝo, vojaĝoj kaj gastigado, vizitu la paĝaron: <https://andaluziaesperanto.wordpress.com/> Venu ĝui kun ni!

[Legu plu.](#)

## HA FALLECIDO NUESTRO AMIGO DARÍO RODRÍGUEZ

El 14 de octubre ha fallecido en Madrid el veterano y activo esperantista Darío Rodríguez López de Silva. A pesar de su edad (nació en agosto de 1931), era una persona muy activa hasta hace unas pocas semanas, cuando tuvo que ser hospitalizado.

Darío aprendió el esperanto muy joven, y fue uno de los impulsores del renacimiento del esperanto en Madrid, tras el parón sufrido tras la guerra civil. Impartió cursos, participó en asociaciones, se ocupó de la difusión del esperanto en los medios de comunicación, etc.

En los años 60 y 70 redujo mucho su



## FORPISIS NIA AMIKO DARÍO RODRÍGUEZ

La 14-an de oktobro forpasis en Madrido la veterana kaj tre aktiva esperantisto Darío Rodríguez López de Silva. Kvankam 84-jara (li naskiĝis en aŭgusto 1931), li estis tre agema ĝis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam li devis esti enhospitaligita. Eĉ se komence aspektis ke la malsano estis zorgiga sed ne danĝera, en la lastaj tagoj lia sanstato subite malpliboniĝis kaj li forpasis en la mateno de tiu tago.

Darío lernis Esperanton tre juna, kaj komencis aktivi en la madridaj esperantistaj rondoj kiuj iom post iom ekvekiĝis post la neniigo kaŭzita de la enlanda milito. Li estis unu el la renaskigantoj de la Madrida E-Grupo kaj de Hispana Esperanto-Federacio, kaj jam en 1954 li estis nomumita voĉdonanto de la estraro de HEF prezidita de doktoro Herrero, nome de la madridaj esperantistoj.

Tie li estis respondeculo pri la servo pri gazetaro kaj radio. Li estis aktiva en la disvastigo de nia lingvo en amaskomunikiloj kaj eĉ gvidis programon

actividad, pero tras su jubilación retomó el contacto con la comunidad esperantista. A pesar de su edad, era un experto usuario de las nuevas tecnologías de la comunicación, y pronto se convirtió en uno de los más activos participantes en los foros esperantistas internacionales, en los que servía de enlace entre personas, asociaciones y actividades de todo el mundo. Su activismo y su gran afabilidad pueden comprobarse en el hecho de que hayan llegado condolencias de todos los continentes en el momento en que se conoció su fallecimiento.

De acuerdo con informaciones de la familia, un funeral religioso en su memoria tendrá lugar el jueves 29 de octubre, a las 7 de la tarde, en la iglesia del Cristo de la Victoria, calle Fernando el Católico con Blasco de Garay en Madrid.

pri Esperanto en la radio.

Li ankaŭ estis sekretario de la Organiza Komitato de la 18-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Madrido, julio 1957.

En la 60-aj kaj 70-aj lia agado draste malpliigis, ĉefe pro personaj kaŭzoj, kaj al tiu periodo li poste nomis (eble iom troige) sia kabejgo.

Tamen, post sia emeritiĝo li revenis al la movado kun rimarkinda forto. Malgraŭ sia aĝo li tre bone regis la retajn ilojn, kaj dediĉis sian aktivadon ĝuste al la partopreno en la unuaj retaj forumoj kaj al la interŝanĝo de novaĵoj de iuj partoj de la movado al la aliaj, super la landlimoj. Tiel, li fariĝis tre konata en internaciaj medioj, kiel atestas la fakto ke el ĉiuj partoj de la mondo venis montraj kondolencoj kiam oni ekkonis lian forpason. Ĉiuj reagoj substrekas lian afablecon kaj helpemon, kaj tia li restos en ĉies memoro.

Laŭ informo de la familio, okazos funebra meso por li la ĵaŭdon, 29an de oktobro, je la 7a vespere, en la preĝejo Cristo de la Victoria, strato Fernando el Católico kruce kun Blasco de Garay en Madrido.

## PRESENTADO EL GRAN DICCIONARIO EUSKERA-ESPERANTO

El sábado 17 de octubre se ha presentado por primera vez en medios esperantistas, en Loyola (Azpeitia, Guipúzcoa) el primer gran diccionario Euskera-Esperanto / Esperanto-Euskera, con la presencia de su autor Aitor Arana. El imponente libro, de más de 740 páginas, ha sido la culminación de muchos años de trabajo, y constituirá a partir de estos momentos una obra de referencia para los hablantes de ambas lenguas. La revisión ha corrido a cargo del profesor holandés Wim Jansen y de la edición es responsable la Asociación Vasca de Esperanto.

El autor, Aitor Arana, es un reconocido escritor en euskera, ganador de numerosos premios literarios en ese idioma. También ha escrito originalmente en esperanto, y es autor de traducciones, entre otras de obras de Bernardo Atxaga. Es autor así mismo de un método de aprendizaje de esperanto para hablantes de euskera.

Tras esta primera presentación, dirigida fundamentalmente a los hablantes vascos de la lengua internacional, están previstas en las próximas semanas otras para el público externo.

La obra puede adquirirse directamente en la Asociación Vasca de Esperanto, en el [servicio de venta de libros](#) de la Asociación Universal de Esperanto y otras asociaciones esperantistas, y en las librerías Katixa, Hontza y Katakarak.

## PREZENTITA LA EŬSKA-ESPERANTA VORTARO

La sabaton 17an de oktobro estis unuafoje prezentita en la esperantista medio, en restoracio en Lojolo (parto de la municipo Aspejtio, Gipusko), la unua granda vortaro dulingva kaj ambaŭdirekta inter la eŭska kaj Esperanto, kun la ĉeesto de ĝia aŭtoro Aitor Arana. La impona libro, kun pli ol 740 paĝoj, estas la kulmino de multaj jaroj da laboro, kaj fariĝos de nun referenca verko por la parolantoj de ambaŭ lingvoj. Pri la revizio zorgis la nederlanda profesoro Wim Jansen kaj pri la eldono, la Eŭska Esperanto-Asocio.

La aŭtoro, [Aitor Arana](#), estas tre konata verkisto en la eŭska lingvo, gajninto de multnombraj literaturaj premioj en tiu lingvo. Li verkis originale originale ankaŭ en Esperanto, sed estas pli konata kiel tradukisto, interalie de verkoj de Bernardo Atxaga. Li aŭtoras ankaŭ lernilon de Esperanto por parolantoj de la eŭska, kaj pretigas nun metodon por lerni la eŭskan per Esperanto.

Post tiu ĉi unua prezentado, direktita specife al la eŭskaj esperantistoj, aliaj estas antaŭvidataj dum la venontaj semajnoj por la ekstera publiko.

La verko estas aĉetebla jam en la [Libroservo de UEA](#) kaj baldaŭ en aliaj libroservoj kaj lokaj librejoj.

## EUSKARA-ESPERANTOA-EUSKARA HIZTEGIAREN AURKEZPENA

Urriaren 17an, Azpeitiko (Gipuzkoa) Loiola auzoan Euskara-Esperantoa-Euskara hiztegi handiaren aurkezpena egin zen. Aurkezpena egileak berak egin zuen, Aitor Arana jaunak, lagun arteko giro esperantistan. Hiztegia ikusgarria da, 740 orrialdekoa, eta urte askoko lanaren emaitza da. Aurrerantzean erreferentzia lana izango da bi hizkuntzen hiztunentzat. Zuzenketa lana Wim Jansen irakasle nederlandarrak egin du, eta argitalpenaren erantzulea Euskal Esperanto Elkartea da.

[Aitor Arana](#) egilea euskal idazle ezaguna da eta sari ugari jaso ditu. Esperantozko itzulpenak egin ditu eta, besteak beste, B. Atxaga, M. Landa eta P. Zubizarreta itzuli ditu. Esperantoa ikasteko ikasliburu bat ere argitaratu zuen.

Batez ere euskal esperantistentzat egindako aurkezpenaren ondoren, komunikabideen aurreko aurkezpena ere izango da. Liburua Euskal Esperanto Elkarteari eska dakiok, [UEAko salmenta zerbitzuari](#) eta beste talde esperantista batzuei. Euskal Herriko Hontza, Katixa eta Katakarak liburu-dendetan ere eskura daiteke.

### Diccionario vasco-esperanto



### VISITA A GUADALUPE

El 3 de octubre el Comité Organizador del próximo [Congreso Español de Esperanto](#), junto con el presidente de la Federación Española de Esperanto, visitaron la ciudad y el monasterio de Guadalupe en Extremadura. Este impresionante monumento será el destino de la principal excursión organizada dentro del Congreso, que tendrá lugar a comienzos de julio del 2006 en la cercana localidad de Herrera del Duque. Unas fotos de la visita pueden verse en [nuestro perfil de Facebook](#).

El monasterio de Guadalupe es una auténtica joya de la arquitectura española, con una riqueza y un patrimonio excepcional, y con una gran significación histórica y religiosa, no sólo en España, sino en toda Latinoamérica. Sobre el mismo puede leerse con detalle en la Wikipedia en esperanto, en [un artículo](#) incluso más completo y detallado que el correspondiente a la versión en castellano.


Recordamos que ya es posible [inscribirse en este 75 Congreso Español de Esperanto](#) y que las informaciones sobre el mismo van recogiendo progresivamente en la web <http://www.esperanto.es/congreso>.

### VIZITO AL GUADALUPO

La 3an de oktobro la Loka Kongresa Komitato de la 75 Hispana Kongreso de Esperanto kaj la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio vizitis la urbon kaj la monaĥejon Guadalupe (Guadalupe, Ekstremaduro). Al tiu ĉi loko direktiĝos la ĉefa ekskurso de la kongreso, kiu okazos komence de julio 2016, kaj kies ĉefa sidejo estos la proksima urbo Herrera del Duque. Oni povas vidi kelkajn fotojn en [nia profilo de Fejsbuko](#).

La monaĥejo de Guadalupe estas vera juvelo de la hispana arĥitekturo, kun escepta riĉeco kaj havaĵo, kaj kun granda signifo historia kaj religia, ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en multaj landoj de Latinameriko. Pri la urbo kaj la monaĥejo eblas legi [tre detalajn artikolojn](#) en la esperanta Vikipedio, pli kompletajn ol eĉ tiuj de la hispanlingva versio.

Ni memorigas ke jam eblas [aliĝi al tiu ĉi 75a Hispana Kongreso de Esperanto](#) kaj ke la informoj pri ĝi iom post iom aperas en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso>.



### SE PREPARA LA VERSIÓN DE DUOLINGO EN CASTELLANO

La famosa web para el aprendizaje de idiomas Duolingo acaba de anunciar los preparativos para lanzar un curso de esperanto para hispanohablantes. Coordinan la preparación Chuck Smith y el presidente de [HEJS](#), la sección juvenil de HEF, Alex Escobedo, y otros colaboradores pueden proponerse [en la web](#).

Se espera que el curso esté disponible dentro de aproximadamente medio año. Los interesados se pueden apuntar ya para recibir un aviso cuando el curso esté ya en marcha, y hasta el momento más de mil personas lo han hecho ya.

En el [curso de Duolingo para hablantes de inglés](#) se inscriben cada día más de mil personas. Hasta el momento más de 160.000 han aprendido o están aprendiendo por este método.

### ESTAS PRETIGATA LA HISPANLINGVA VERSIO DE DUOLINGO

La tre sukcesa retejo por lernado de lingvoj Duolingo ĵus survoĝigis la pretigadon de Esperanto-kurso por hispan-parolantoj. Preparas la kurson Chuck Smith kaj la prezidanto de [HEJS](#) Alex Escobedo, kaj pliaj helpantoj povas sin proponi [en la retejo](#).

Oni esperas ke post proks. duonjaro ĝi pretos. Interesitoj povas jam nun enskribiĝi por ricevi atentigon, kiam la kurso enretos. Jam pli ol milo da homoj anoncis sin ĝis nun.

La [Duolingo-kurso por anglaparolantoj](#) dume plu havas ĉiutage pli ol mil aldonajn eklernantojn; entute ĝis nun eklernis tie pli ol 160 mil homoj.



### AYUDAS DE LA FUNDACIÓN ESPERANTO

La Fundación Esperanto ha anunciado en el último Boletín de la Federación Española de Esperanto que aún no ha recibido candidaturas para su oferta de ayudas para el año 2015. Por esta razón, recuerda que la Fundación ha programado diversas ayudas para la enseñanza y la difusión de la lengua internacional. Se podrán subvencionar cursos de esperanto, edición de libros, desarrollo de eventos, etc. Es posible hacer otras propuestas y sugerencias.

### HELPOJ DE FONDAĴO ESPERANTO

La Fondaĵo Esperanto anoncis en la lasta Bulteno de HEF ke ĝi ankoraŭ ne ricevis petojn koncerne al la nuna jaro 2015. Tial, ĝi memorigas ke la Fondaĵo programis por 2015 helpojn por instruado kaj disvastigado de Esperanto. Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto, ekzemple: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj, ktp. Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ la 30a

Las peticiones deben llegar a la Fundación antes del 30 de noviembre de este año.

Para conocer más detalles sobre la Fundación, y la manera de contribuir a sus actividades, puede visitarse su página <http://www.esperanto.es/fundacion>.

de noviembre de 2015.

Por koni pli da detaloj pri la Fondaĵo, kaj la manieron kontribui al ĝi, vizitu ĝian retejon <http://www.esperanto.es/fundacion>.

